

Geografia nomenklatur, 13-a parto
Kiel devus esti mondmapo en esperanto
Claude Gacond, 295-a radioprelego, 1969.06.04 & 07

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum dekduo da prelegoj ni vin atentigis pri la graveco de la debato malfermita de Tibor Sekelj per la eldono de *Mondmapo* kaj de propono de geografia nomenklatur.

A.- Antaŭ du semajnoj, kaj post atenta studo pri diversaj aspektoj de la proponita nomenklatur, ni klare esprimis nian kontraŭstaron al ĝi. Tiam kelkaj el vi sin demandis : Sed kion ili fakte deziras ?

Cl.- Jen kiel devus esti esperanta mondmapo, laŭ nia vidpunkto.

A.- Ĝin malfermante oni tuj devus rimarki du aspektojn : ke la nomenklatur estas donita en la naciaj lingvoj kaj en esperanto.

Cl.- Tio signifas, ke unuflanke tiu mondmapo majstre respegulus la mondan babelismon, ĉar la geografiaj nomoj estus skribitaj en plej diversaj lingvoj kaj alfabetoj.

A.- Se per nia rigardo ni irus de okcidenta Eŭropo al orienta Azio, ni povus vidi sur la mapo sin desegni la teritoriojn, kiuj uzas la latinan alfabeton, kaj poste la cirilan alfabeton, kaj poste la plej diversajn skribojn, por fini per la ideogramoj en Ĉinio kaj Japanio.

Cl.- Jen la monda geografia situacio, ŝajnus diri tiu mapo. Kaj vi povas imagi la intereson de tia dokumento, ĝuste pro la aŭtenteco de tiuj nomoj, kiuj kvazaŭ atestus pri la ekzistaro de la plej diversaj lingvoj.

A.- Sed per alia koloro sub tiuj nomoj troviĝus ilia esperantigo. Sed esperantigo, kiu ne devas esti farita laŭ la metodo de Internacia Komisiono por Ordigo de Geografiaj Nomoj. Tiu esperantigo devus respekti la personecon de la geografiaj nomoj. Tiu esperantigo devus konsideri la geografiajn nomojn, kiel proprajn nomojn.

Cl.- Tiu esperantigo devus klopodi transskribi la geografiajn nomojn per la literoj de la esperanta alfabeto sen konsideri la esperantan gramatikon. Tio signifas, ke ĝi devus rezigni alglui al ĉiu geografia nomo la substantivan **o**. Se vi volas, ni havus geografian radikaron.

A.- La *Japana Enciklopedieto* finiĝas per mapo de Japanio, kie la nomenklatur estas esperantigita laŭ metodo tre kontentiga. Sur ĝi la nomoj de la ĉefaj japanaj insuloj estas : **Kjuŝu**, **Ŝikoku**, **Honŝu** kaj **Hokkaido**. Ĉu tiu transskribo ne estas pli konforma al la geografia realeco, ol la transskribo proponita de Tibor Sekelj ? Aŭdu : **Kjuŝuo**, **Ŝikokuo**, **Honŝuo** kaj **Hokajdo**. En tiu dua esperantigo oni neniam scias, ĉu la fina **o** apartenas al la radiko aŭ estas esperantaĵo.

Cl.- Tiu *Japana Enciklopedieto* ŝajnas al ni vera modelo rilate al geografio, kiel cetere rilate al multaj aliaj fakoj.

A.- Sed nun ni ĵetu rigardon al Eŭropo. Ne necese ĉiuj nomoj devas esti fonetike transskribitaj. Se ni ekzamenus la riverojn Rejno kaj Danubo, ni ekzemple rimarkus, ke sur la mondmapo ili posedas plurajn nomojn.

Cl.- La rivero Rejno posedus la nomojn **Rhein**, **Rhin** kaj **Rijn**, laŭ la lingvo-teritorio, kiujn ĝi akvas.

A.- La rivero Danubo nomiĝus **Donau**, **Dunaj**, **Dunav**, **Duna** kaj **Dunarea**.

Cl.- Tiel, konsultante la mondmapon, ni havus kontakton kun la etimologia realeco. Kaj tuj vi komprenas, ke tiu mapo estus utila ilo uzebla por la instruado pri geografio, dum la mapo, kiu nun estas al ni proponita, estas ilo neuzebila en la lernejoj.

Geografia nomenklaturu, 13-a parto
Kiel devus esti mondmapo en esperanto
Claude Gacond, 295-a radioprelego, 1969.06.04 & 07

A.- Kiam la nacia fonetiko sufiĉe kongruas kun la esperanta fonetiko, esperanta transskribo ne estus necesa aŭ tre similus la nacian formon.

Cl.- Jen formoj, kiuj ne ŝanĝiĝus : Helsinki, Oslo, Hamburg, Madrid, Roma, London, Berlin, Bern, Stockholm, Napoli, Santiago, Peru.

A.- Jen formoj, kiuj iomete ŝanĝiĝus : Pariz, Ĝenev, Alĝer, Tuniz, Kuba, Brazilja, pro fonetikaj kaj alfabetaj diferencoj inter esperanto kaj la naciaj idiomoj.

Cl.- Legante tiun mapon oni tuj sciis, ĉu la fina **o** estas esperanta kripligo aŭ propraĵo de la nomo mem. Kaj en tiu transskribo estus severe malpermesite forpeli la finan vokalon profite al nia substantiva **o**. Napolo, Helsinko, Kubo forestus.

A.- Ĉiu scias, ke geografiaj nomoj gramatike estas substantivoj. Se en teksto estas absolute necese uzi la esperantajn finaĵojn, tion oni ĉiam povas fari. Sed sur mondmapo, tio estas simpla herezaĵo laŭ scienca vidpunkto aŭ eble lingva infanismo. Ambaŭ nur povas malutili al esperanto.

Cl.- Do, sur esperanta mondmapo oni devas trovi la esperantigojn Sumatra, Madagaskar, Angola, Madras, Sidne, Melburn, Aŭkland, Gobi, Amsterdam, Istanbul, Montenegro, Vaduc.

A.- Gramatike oni devos konsideri, ke kiam vorto komenciĝas per majusklo, tio signifas, ke ĝi ne estas normala radiko, sed geografia aŭ historia aŭ persona nomo. La esperantaj finaĵoj povas esti uzataj, sed kelkfoje streketo estas utila. Tiel oni povas paroli pri la Vaduca kastelo, por la kastelo de Vaduc, la Gobia dezerto por la dezerto Gobi.

Cl.- Kaj por la ĉefaj nomoj oni povus indiki pliajn transformojn. Sed tiujn transformojn ni devus fari laŭ bone difinitaj principoj. Ekzemple Angolo povas esti pli indikita ol Angola, same Kanado preferata al la formo Canada. Sed tiam oni povus preferi formojn kiel Angolio, Kanadio. Nenio estas definitive decidita. Kaj ni rajtus povi legi klarigojn, pri tiuj formoj propraj al nia lingvo.

A.- Konklude ni diros, ke kio karakterizas nian lingvon, tio estas la kunekzistado de formoj pure esperantaj apud formoj pli universalaj : tiel kunekzistas formoj kiel redaktado, redaktejo, redaktistaro apud la sinonimo redakcio. Kial en geografio ne kunekzistus kelkfoje formoj pure esperantaj apud formoj pli universalaj, kiel Danlando apud Danemark, Saharo apud Sahara ?

Cl.- Sed ni neniam forgesu, ke fonetika transskribo estas fine multe pli proksima al la vivo mem, ol ĉiu ajn esperantaj kripligoj. Jen laŭ la *Japana Enciklopedieto* la gubernioj de la insulo Kjuŝu : Kagoŝima, Mijazaki, Kumamoto, Oita, Saga, Nagasaki kaj Hukuoka.

A.- Ĵurnalisto, kiu uzus tiun nomenklaturon estus komprenata en la tuta mondo. Nun ĵurnalisto, kiu trovas la esperantigojn Kjuŝuo, Kagoŝimo, Mijazako, Kumamoto, Oito, Sago, Nagasako kaj Hukuoko troviĝus antaŭ malfacila laboro, kiam li devus doni la ekvivalentojn en nacia lingvo.

Cl.- Konsultu momenton la mondmapon de Tibor Sekelj, kaj tre baldaŭ vi dubos pri vi mem.

A.- Tion ni devas absolute eviti per pli scienca laboro.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-